

31 B^d Mariette
Boulogne s/Mer
la 16^{an} de Dec 1925

1

Kara Korespondinto

Kiam mi komencas ĉi-tiun leteron, mi sentas du malsimilajn impresojn; la unua estas impreso de ĝojo ĉar dum kelkaj momentoj, de nove, mi ekbabilados kun vi, + la dua estas impreso de doloro ĉar pro via peto, pro via deziro, nia korespondado tiel agrabla devis ĉesiĝi.

Ĝi lasis al mi tiom da lertaj leteroj kiom da interesaj rakontoj + faktoj ke mi sentas akran bedaŭron ke tio kio estis ne povas plu esti.

Tamen, por Kristnasko + por la venonta jaro, mi devas al vi sendi miajn tut'korajn bon'dezirojn por via Edzino, por vi mem + por via Eveto. Estu feliĉaj serenaj + animtrankvilaj.

Pri Esperanto, mi ĉiam okupiĝas legante "La Heroldo de Esp" + "Esperanto" de U.E.A. Mi ĉiam korespondas kun mia 9 jara korespondanto el Meksikujo, kun D^{ro} Broder + kun la familio Zamenhof. Mi restas ĉiam fidela al miaj korespondantoj. Mia edzo + mi ĉeestis la Belgan internacian kongreso² en "La Paune" je Pentekosto, el kie mi al vi sendis P.Karton. Bedaŭrinde, ni ne povis ĉeesti Edinburgon + ni certe ne iros Dantzigon. Estas tro da tempo sen kongresoj, sen samideanoj, sed kion fari, ho ve!

Mi ĉiam legas en la gazetoj, ĉion kio rilatas al via bela lando. Ĉeko-Slovakio por mi estas bela, prospera lando + plena da kortuŝantaj rememoroj.

Eble, eĉ sendube, vi estas nuntempe la urbestro de via urbo aŭ se ne vi baldaŭ estos, + la muziko + la politiko okupas vian tutan libertempon, ĉu ne?

Mia edzo laboras ĉiam multege. Ni havas aŭtomobilon: la "Renault" - 4 lokoj - fermita, + ĝi multege interesigas mian edzon.

Ni estas tre okupitaj ĉar, mardon proksiman, nia filo edziĝos, en Montreuil sur-mer (je 1 horo de ĉitie) kun bela, bona fraŭlino de³ 19jara. Ili estas kvazaŭ 2 geinfanoj. Ili loĝos en Montreuil ĉar mia filo devos sundube repreni la oficon (solicitoro - "avoué") de sia bo-patro ... Mia filo estas advokato + D^{ro} en leĝo-scienco, sed li ne gajnas tiom kiom solicitoro. Sed oni forprenis la tribunalon de Montreuil kiel 227 aliajn + ili devos veni 2foje po semajno al la tribunalo de Boulogne.

La edziĝo do estos mardon, estos 42 personoj matene + 62 vespere. La geedzoj iros al Cannes poste dum 15 tagoj. Mi ne povas kredi ke estas mia filo kiu edziĝos, ni estas kiel gefratoj + anstataŭ ol maljuniĝi mi sentas min plijuniĝi!

Mia edzo petas min sendi al vi siajn plej sincerajn bondezirojn por Kristnasko + 1927. Ke la venonta jaro alportu al vi multajn procesojn + viajn sukcesojn.

Mi esperas ke 1927 alportu al mi unu aŭ kelkajn leterojn de vi. Oni bezonas nur la inklinon + iom da energio por preni la plumingon + ... babiladi + rakonti siajn pensojn + agojn!! + estas tiel granda ĝojo legi tiujn leterojn.

¹ manskribita noto: "odp. 25/12 26"

² ĉu "kongreson" ?

³ ĉu "de" ne estas superflua?

Do, kun espero je 1927, mi al vi premas amike, la manojn, rememorigante la pasintan korespondadon.

Ĉiam sincere + same

Alice Sergeant